




**ROK XXIV.  
JARO XXIV.**

**N-ro 2. N-o**

**L U T Y 1930.  
FEBRUARO 1930.**

**EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.**



**Kraków, nomata „Frezorejo de Pollando“, estas fama pro siaj artaj kaj kulturaj memorindaĵoj. La supra bildo prezentas kolonaron de Draphaloj kun S-a Maria preĝejo dekstre.**

**ESPERANTYSTA POLSKI  
POLA ESPERANTISTO**

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &  
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

**WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!**

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado”.

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Leo Turno: **Kompletny Podręcznik** estas sendata ĉiam tuj, en la sama taĝo, en kiu venas ia mendo. Bonvolu noti la opajn prezojn (poŝtpago enkalkulita) (1 ekz. 1,25 zł):

5 ekz. — zł 5.—		10 ekz. — zł 9.50
20 „ — „ 19.50		30 „ — „ 27.—
50 „ — „ 45.—		100 „ — „ 85.—

Leo Turno: **Wyższy Kurs języka Esperanto** estas vendata (poŝtpago enkalkulita) (1 ekz. 2.— zł):

5 ekz. — zł 7.50	(anst. 10.— + poŝtp)
20 „ — „ 28.—	( „ 40.— „ „ )
50 „ — „ 70.—	( „ 100.— „ „ )

Pagu al PKO No 405.716, Kraków, aŭ al Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

**TREŚĆ — ENHAVO:**

O. BUJWID: BENEDYKT DYBOSKI. M. F. ONNEN: STATISTIKO PRI LA U. E. A. DRO ADAM GADOMSKI: POLAJ NOMOJ EN GEOGRAFIO DE LA MONDO. LENA: REMEMORO FUNEBRA. O. BUJWID: BIBLIOGRAFIO. O. B.: EL LA NE-ESPERANTA GAZETARO. TRADUKA KONKURSO. POLLANDA KRONIKO. XXII-A UNIV. KONGRESO DE ESPERANTO. PRINTEMPA FOIRO LEIPZIG 1930. ALVOKO AL LA ESPER. VIRINARO. ALSENDITAJ GAZETOJ.

# POLA ESPERANTISTO

MONAĴA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO  
KAJ EKSTERLANDE.

## ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE  
I ZAGRANICĄ

ROK XXIV JARO


KRAKÓW  
LUTY 1930 FEBRUARO

Nr 2 N-o

### BENEDYKT DYBOWSKI.

**J**am delonge li apartenis al la historio de la homaro, ĉar li mem estis viva historia libro de alta patriotismo de la granda merito sciencista kaj de profunda amo por la tuta homaro. Lia vivo estis ne nur nekutime longa, sed ankaŭ nekutime fruktodona.

Dum 96 jaroj de sia vivo, jam de la frua juneco, li komencis laboron sciencan kiel profesoro de la Zoologio en la Warszawa Supera Lernejo\*), kiu anstataŭs Universitaton en la jaro 1862. Tute proksime al la scienca laborejo lia amiko Romuald Traugutt estris Na-



cian Komitaton de la Pollanda Insurekcio kontraŭ la registaro Rusa. Du jarojn daŭris kruelaj ma tiraĵoj. 5-an de aŭgusto estis pendigitaj kvin estranoj: Traugutt, Toczyski, Krajewski, Jeziorański kaj Luliński Dybowski, morala helpanto de la insurekcio, estis ankaŭ mortjuĝita

sed dank' al la penado de prof. Reichert el Berlino kaj prof. Grube el Breslau pro siaj tre grandaj sciencaj meritoj la mortpuno estis ŝanĝita

\*) Szkoła Główna.

je la ekzilo al la siberiaj minejaj laboroj. Eĉ en Siberio oni tuj rekonis lian grandan sciencan valoron kaj ebligis al li vojaĝon por esplorado de nekonataj ĝis nun vastaj siberiaj regionoj. Liaj esploroj de Kamĉatka, Bajkal, rivero Amur kaj insulo Sahalin famigis lian nomon en la mondscienco kaj li estis la duan fojon nune ne pli kiel ekzilulo sed kiel jam unuaranga esploristo sendita de la petersburga Akademio por plujmalkovroj kaj esploroj \*\*). Ne estas tie-ĉi loko por diri pri liaj grandaj zoologiaj, etnografiaj kaj aliaj laboroj. Ni rememorigos nur lian eksterordinaran homaman senton kaj tute nekutiman etikeman penadon dum tuta vivo. Tiu granda homarano neniam povis malami: eĉ pri siaj malnoblaj malamikoj li ĉiam parolas kaj skribas kompateme. Vere superhoma sento kaj profunda komprenemo de la homa naturo!

Dum la tuta vivo li kontraŭbatalis alkoholaĵojn kaj neniam ilin uzadis. Li estis abstinentulo dum tuta vivo. Li ofte priskribas la malmutilon de alkoholaĵoj observitaj en Rusujo dum siaj longaj vojaĝoj.

Benedykt Dybowski estis unu el nemultnombraj scienculoj, kiu ekkomprenis valoron de Esperanto por sciencaj interrilatoj. Ne nur por la scienco, laŭ lia rigardo, estas nia lingvo tiom valora. Ankaŭ por ĉiuj homaj interrilatoj. Li ofte skribis kaj legadis esperante. En Pola Esperantisto li skribis la leteron pri beleco kaj uzeblcco de la lingvo, kiu nun estas leginda kiel valora dokumento (vidu n-ro 6 — 1928).

La lasta letero kiun mi ricevis de li estas salutletero al la PED kongreso dum la Tutpollanda Ekspozicio. Letero skribita pollingve estas ĉi sube tradukita.

### LA LASTA LETERO.

Lacigita de aĝo kaj kronika malsano mi ne povas persone partopreni la kunvenon en Poznań.

Mi povas nur saluti la plej altan kulton el ĉiuj, ĉar kiam aliaj kultoj estas en la profundo egoistaj, maltoleremaj, militemaj ĉiu pri la potenco — Esperanto kontraŭe ĝis la fundo estas altruista, pacema — ampleksas tutan mondon per la frata amo, penas unuigi ĉiujn popolojn je unu granda familio, kies celo estas vero kaj bono.

La esperanta kulto estas laboro kiu penadas realizi niajn plej varmajn sentojn — vidi tutan homaron feliĉa kaj morala.

Mi esprimas mian plej profundan senton al la kreinto de Esperanto Dro Ludov. Zamenhof kaj sendas miajn plej korajn salutojn al ĉiuj, kiuj en lia nomo laboradas por la bono kaj prospero de la tuta homaro.

**Dr. Dybowski, Lwów.**

### GENERALO SEBERT.

Grava sorto samtempe forrabis el nia rondo unu el plej amindaĵoj kaj altŝatindaĵoj Samideanoj — nian amatan Generalon Sebert!

Kiu ne konis fervoran propagandulon; 92 jara jam grave malsanigita ne pli ellitiĝante, li ĉiam legis kaj skribis eĉ tre multe monhelpis la Esp. aferon.

\*\* En 1883 li estis nomita profesoro en Lwów.

Antaŭ du jaroj mi vizitis lin en Parizo. Ne povante ellitiĝi, superŝutita de paperaĵoj, li diktadis al sia sekretariino diversajn leterojn precipe de la esperanta enhavo. Li parolis kun juneca fervoro pri Esperanto-propagando en Francujo. Li multe plendis la ĝisnunan miskomprenon kaj neagadon, profetante baldaŭan ŝanĝon de la opinio. Kaj li ne eraris. Oni rimarkas hodiaŭ multe pli da agado en Lia Patrujo.

O. Bujwid.

## STATISTIKO pri la U. E. A.

**E**n la Kongreslibro de Budapeŝto, p. 74-a, oni trovas la nombrojn de membroj, kiujn havas UEA en ĉiuj landoj de la mondo, kaj en la UEA-jarlibro estas menciitaj la nombroj de la tuta loĝantaro en diversaj landoj. Tiuj du nombroj ebligas fari kalkuladon pri la procenta nombro de UEA-membroj en ĉiu lando. Mi faris tiun kalkuladon, ne laŭcente, sed laŭmilione; jen kelkaj rezultoj:

LANDO	LOĜANTARO (milionoj)	UEA-noj	En ĉiu miliono da loĝantoj la lando havas UEA-anojn:
Aŭstrujo	6.5	315	48
Belgujo	7.5	289	39
Britujo	44.3	745	17
Bulgarujo	5.5	218	40
Ĉeĥoslovakujo	13.6	1361	100
Danujo	3.4	80	24
Francujo	41.5	633	15
Germanujo	60.—	1403	23
Hispanujo	21.3	319	15
Hungarujo	8.—	117	15
Italujo	40.5	302	7
Nederlando	7.8	449	58
Polujo	30.—	352	12
Portugalujo	6.—	19	3
Svedujo	6.—	238	40
Svisujo	3.9	258	66
Usono	106.—	366	3

Kion ni povas lerni el tiuj ciferoj?

1. La plej altan ciferon havas Ĉeĥoslovakujo, nome 100 UEA-anojn el ĉiu 1.000.000 da enloĝantoj. Laŭdo! Laŭdo! ĉar ĉiu el ni scias, ke nur per intensa laboro tia rezulto povis esti akirita. En la daŭro de 6 jaroj, la nombro de UEA-anoj pligrandiĝis tiom, ke nun tiu lando superas eĉ Svisujon, la sidejon de nia Asocio. Ĝi havas la 2-an lokon, kaj Nederlando la 3-an.

2. Tiuj 3 ŝtatoj estas kuŝantaj — speciale Svisujo kaj Nederlando — inter alilingvaj popolegoj, sed mi ne kuraĝas konkludi, ke tiu cirkonstanco estas la **kaŭzo** de ilia alta cifero.

3. Neniu el la grandaj ŝtatoj (pli ol 20 milionoj) havas ciferon, kiu estas komparebla kun tiu de la 3 nomitaj malgrandaj. Germanujo montras, el ili, la plej favoran nombron, tamen nur 23.

La ĝenerala rezulto de 20-jara laborado de UEA ne estas tre kuraĝiga, ĉar en la plej favora ŝtato, Ĉeĥoslovakujo, nur 100 el ĉiu 1.000.000 da homoj aniĝis; tio estas nur 0.01%.

Feliĉe la nombro de UEA-anoj tutcerte estas malpli granda ol la nombro de Esperantistoj en la tuta Mondo, ĉar ekzistas ankaŭ grandaj unuiĝoj kiel I. K. U. E., S. A. T., dekoj da Naciaj, centoj da Lokaj Rondoĵ, kaj Fakaj Asocioj. Laŭ la Statistiko de Dro DIETTERLE („Esperanto“, 1928-a, p. 134-a) la nombro de UEA-anoj estas malpli ol 7% el la tutmonda nombro (126.000). Do ni rajtas 15-obligi la ciferojn de nia suprestaranta tabelo, por havi la tutan nombron en ĉiu lando. Sed ankaŭ tiam la rezultoj ne estas kontentigaj, ĉar Ĉeĥoslovakujo tiam havas nur 0.15%! Post 40-jara ekzistado de Esperanto! Se ni, UEA-oficialuloj, estus malkuraĝigeblaj, ni haltigus niajn penadojn, sed nun ni multobligu ilin! La ĉeĥoslovaka ekzemplo al ni montru, kiom povas rezultigi daŭra, intensa, senhalta laboro.

Iro M. F. Onnen.

## POLAJ NOMOJ EN GEGRAFIO DE LA MONDO.

**E**n priskriba ĝeografio de la mondo troviĝas tuta vico da polaj nomoj. Krom nomoj donitaj precipe al lokoj de polaj koloniuloj pro pietismo por la patrolando, estas sur la karto de la mondo multaj nomoj donitaj de sciencaj institucioj honore al Poloj malkovrintoj aŭ al iliaj sciencaj meritoj. Tiuj nomoj estas por la mondo montriloj de agadteritorioj de polaj esplorintoj, kaj samtempe multedira pruvo de iliaj meritoj ĉe malkovrado de nekonataj landoj kaj maroj.

En la vico de polaj nomoj oni devas citi sekvantajn:

**Montoj de Czerski.** En 1926 rusa esploristo Obruĉev sciigis, ke sur la riverteritorio de Indigirka en norda Siberio li malkovris vastan kaj altan montan ĉenon (inter 140° kaj 150° de orienta longo kaj inter 62° kaj 70° de norda larĝo). Laŭ la decido de rusa ĝeografia societo tiuj montoj ricevis nomon de Czerski (Ĉerski), ĉar montriĝis, ke jam antaŭe malkovris ilin kaj unua esploris Jan Czerski (1845—1890), Polc forpelita Siberion en j. 1863.

Tiu ĉi potenca montara ĉeno estas 1.000 km. longa, 300 km. larĝa kaj posedas zonojn 3.000—3.300 m altajn super la marnivelo. Obruĉev komunikas interesajn detalojn koncerne la neĝkovriĝon de la montoj. Ili estas kovritaj de eterna neĝo, kies limo en aŭgusto kaj septembro kuŝas ĉ. 1.600 m s. mn. Malgraŭ tio oni ne trovis tie glaciarojn, sed oni konvinkiĝis pri rimarkinda glaciĝo de tiuj montoj. La ĉeno de Czerski posedas ĉiujn karakterizaĵojn de glaciara pejzaĝo kaj jen koridorajn valojn, morenojn (altiĝantaj kelkfoje ĝis 400 m super la fundo de la hodiaŭaj valoj), lagojn glaciaraĵajn, valojn pendantajn ktp.

**Akvofalo de Czerski** estas en Siberio, sur la rivero Ĥorak, kiu post kuniĝo kun Ĥonŝon formas la riveron Urik en la riverteritorio de Angara. La akvofalo estas 10 m longa kaj 7 m alta kaj estas nomita honore al Jan Czerski, kiu ekzamenis tiujn ĉi ĉirkaŭaĵojn.

**Montoj de Przewalski** (pŝevalski) en Tibeto, inter  $37^{\circ}$  kaj  $36^{\circ}$  de norda longo kaj  $87^{\circ}$  ĝis  $92^{\circ}$  de orienta larĝo de Greenwich, nomitaj honore al mondfama pola vojaĝisto generalo Nikolao Przewalski, kiu estante en la rusa servo, esploris orientan Azion. Ĉi montoj atingas 7.000 m s. mn.

**Przewalsk.** En la j. 1888 gen. Przewalski elmarŝinte al la kvina malkovra vojaĝo al Azio mortis en distrikta urbo Karakoŭ en Turkeŝtano. Honore al la esploro, Karakoŭ estis alinomata Przewalsk.

**Monto de Kościuszko** (koscjuŝko). Ĝi estas la plej alta monto en Aŭstralio, 2.240 m s. mn. en Aŭstraliaj Alpoj, sur teritorio de Nova Suda Valio, proksime de Viktorio. La nomon donis malkovrinto de ĉi monto, pola vojaĝisto, Edmund Strzelecki (ŝcelecki).

**Insulo de Kościuszko** apud Alaska, ĉe okcidenta bordo de Nordameriko, sub  $56^{\circ}$  de norda larĝo, montriĉa, ŝirita de fjordoj estas ĉ. 46 km. longa. La nomon donis esploro de Alaska W. H. Dall en j. 1879.

**Kościuszko** 1) Urbo en ŝtato Missisipi, nordokcidente de Jakson. 2) Komunumo en ŝtato Indiana. 3) Komunumo en ŝtato Teksas. 4) Homejo en ŝtato Indiana. Ĉiuj ĉi lokoj estas en Usono.

**Antaŭfortikaĵo de Sułkowski.** En Kairo, en nord-okcidenta parto de l' urbo sur la placo Midan El Zehir. Ĝi estas nomita de Francoj honore al kolonelo princo Sułkowski (suŭkofski), kiu estis mortigita dum bataloj de Napoleono sur stratoj de Kairo.

**Puŭaski** (puŭaski), urbo en ŝtato Pensilvanio sub  $80\frac{1}{2}^{\circ}$  de okc. longo kaj  $41^{\circ}$  de norda larĝo, ĉe enfluejo de l' rivero Savannah.

**Sobieski.** Komunumo en ŝtato Wisconsin en Usono (inter loĝantoj estas 600 Poloj).

**Poniatowski** (ponjatofski). Komunumo en ŝtato Wisconsin en Usono (inter loĝantoj estas 550 Poloj).

**Glaciaro de Romer.** En Alaska. Oni donis la nomon en Usono honore al nuntempa pola geografo prof. E. Romer.

**Insulo de Maŭricio Beniowski** (benjofski). Sub  $58^{\circ}$  de orienta longo kaj  $20^{\circ}$  de suda larĝo. La nomo donita honore al konkirinto de Madagaskaro.

**Montoj de Domejko** inter  $25^{\circ}$  kaj  $22^{\circ}$  de suda larĝo kaj inter  $70^{\circ}$  kaj  $67^{\circ}$  de okcidenta longo.

**Domejko.** Urbo en Sudameriko, sub  $70^{\circ}$  de l' okcidenta longo kaj sub tropiko de kaprikorno. (Ambaŭ nomoj honore al Polo Ignaco Domejko, esploro de Ĉilo).

**Rivero de Strzelecki.** En suda Aŭstralio. Fluas en riveron de Cooper, venantan el lago Erye.

**Monto de Arctowski.** Proksime de Ŝpicberg, sub  $16\frac{1}{2}^{\circ}$  de orienta longo kaj sub  $78^{\circ}$  de norda larĝo.

**Antaŭfortikaĵo de Motyliński.** En centra Afriko, en montoj Ahaggar sub  $23^{\circ}$  de norda larĝo kaj  $15^{\circ}$  de orienta longo, honore al pola esploro tie mortinta en j. 1906.

**Insulo de Wojewódzki** (vojevucki). Sub  $133^{\circ}$  de okcidenta longo kaj  $58^{\circ}$  de suda larĝo. Wojewódzki kaj Zarembo estis kapitanoj de rusa ŝiparo en unua duono de XIX jrc.

**Insulo de Zarembo.** Sub  $132\frac{1}{2}^{\circ}$  de okc. longo kaj  $57\frac{1}{2}^{\circ}$  de suda larĝo.

**Urbo de 3 Majo.** En Sudameriko sub 52° de okc. longo kaj 25<sup>1</sup>/<sub>2</sub>° de suda larĝo.

**Warszawa.** Komunumo en Ŝtato Dakota, Usono (Inter loĝantoj estas 1.600 Poloj). En ŝtatoj Kentucky kaj Virginio troviĝas urboj kun nomo „Warsaw“.

**Urbo Baranówka.** En Suda Ameriko sub 50° de okcidenta longo kaj 26° de suda larĝo.

El geografiaj nomoj supozeble de pola deveno, oni devas citi Insulojn de Przybyłowski (pŝibiŭofski) sur Trankvila Oceano kaj Insulojn de Bogusławski (bogusŭafski) sur maro de Bering Tamen la genezo de tiuj nomoj bezonas ankoraŭ esploron.

**Dro Adam Gadomski.**

Al Samideano, prof. Benedykt Dybowski

## Rememoro Funebra.

Junan vivon, kiel la pafarkon,  
Li al unu nur elstreĉis celo:  
El katenoj forŝiri patrujon,  
Lumon meti al pleja malhelo.

Vanis ĉio. Aŭdis Siberio  
Liajn ĝemojn, eble larmojn vidis,  
Kiam blanka mortmalvarma spaco  
La sopiron je patruj' priridis.

Preterpasis plendoj, pezaj jaroj,  
Eksilentis obtuz' de sufero  
Kaj eksentis ekzilitaj lipoj  
La dolĉecon de patruja tero.

Nun fariĝis liaj tagoj, jaroj,  
La ĉeneroj de labora ĉeno,  
Maturiĝis Amo en la koro,  
Briletante en la pompa pleno.

Al kunfratoj jam liberigitaj  
Flustris li en ĉi feliĉa horo:  
„Mortu sangversad', milit', malamo,  
Kresku, floru Amo, Paclaboro!“

Sur la tombon Vian kiel kronon  
Metas ni por Vi plej karan vorton:  
Patruj' vivu! Vivu la Homaro,  
Ĉio bela, bona havu forton!

**Lena.**

## BIBLIOGRAFIO.

**L. L. Zamenhof Originala Verkaro.** Antaŭparoloj, Gazetartikoloj. Traktaĵoj, Paroladoj, Leteroj, Poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dieterle. Ferd. Hirth & Sohn en Leipzig 1929 Esperanto-Fako.

Jen la libro, kiu devas trovi honoran lĉkon en ĉiuj Esperanto-bibliotekoj. Ne nur restadi en la biblioteko kiel valora dokumentaro de la genia eltrovo, sed kiel ĉiutaga konsildonanto al ĉiu esperantisto, kiu deziras taŭgan konsilon de la Aŭtoro mem en diversaj malfacilaĵoj de la Esperanto lingvistudoj. Ĉar tiu libro reprezentas preskaŭ tutan vivon de la Majstro, ĉiujn travivaĵojn, klopodojn, klarigojn por amikoj kaj malamikoj, eĉ profetaĵojn, kiuj jam efektiviĝis kaj aliajn, kiuj sendube iom post iom nepre efektiviĝos.

Modesta kolektanto, kiel sin nomas mem nia altestimata Samideano D-ro Dieterle konstruis por la tutmonda Esperantistaro grandan meritplenan verkon, ankaŭ por si mem monumenton kiu restos — por ĉiam aere perennius — kiel diras Horaco.



**bezwłoczny** senatenda, \*bęben infanaĉo (nieznoś-  
baldaŭa ne dziecko)  
bez widoków sen(bon)-  
šanĉa bębenkowa błona tim-  
panmembrano  
\*bezwodny anhidra beblek (bot.) pepliso (be-  
błęk) bębniaŝty ŝvelinta  
bezwrażliwość analgezio, hĉniasy ŝvelinta  
senimpresebleco, ane beda ludzie z niego li  
stezio, sensent(em)(ec)lo taŭgos, sukcesos  
(nieczułość na ból) \*ĉl-art hibrido, mestizo,  
barseno, mulato (mie-  
szańce)  
\*bezwstydy ekshonti- \*ĉiadaĉ vei  
ĝinta (który wyczbył bialnik albumino (albu-  
się wstydu) min)  
bez wyrazu senesprima ĉiała broń tranĉarmilo  
(n. p. twarz) białaczka leŭkemio, leŭ-  
kopatio  
bezwyznaniowiec senreli- ĉiała dubelblanka, al-  
giulo, senkonfesulo \*białawy bugeca (anat.)  
\*bezwzględny senkonsi- białek leŭkomo (bielmo)  
dera (bez zastanowie- białe upławy blankfluo,  
nia), senpardona (nie leŭkoreo  
darujący) severega (su- białka (białogłowa) viri-  
rowy), perforta (gwał- no  
towny), absoluta, nepr \*białko albumino (albu-  
(konieczny) sendiskuta, min, bialnik) sklero (b.  
senhezita (niewahający oka, twardówka)  
sie), senskrupula, bru- białko jaja ovoblanko  
tala białkomocz albuminurio  
beżębne (zool. z waleni) białkówka okulblanko  
mistiketacoj białkowy albumena  
bez zmaży ĉasta, senma- białoŝard (zool.) matace-  
kula lo (pliszka)  
beznamienny senkara- \*białogłowa homino  
kteriza białoŝon (zool.) maraglo,  
beżab (bot.) marubio piĝargo (bielik)  
(balota) białokrwistość leŭkemio  
bez żółci sengala, dolĉa, białoryb olszanka cipre-  
bona, malkolerema no (bystrzyk)  
bez życia anorgana (nie-  
organiczny)

**bakałar** bakalaŭro (kiu drzewo), pak(a)lo, vol-  
posedas la unuan aka- vajo (paka)  
demian gradon) balanos — ĝlano (zo-  
bakarat (kartl.) bakarato ładz), daktilo (daktyl)  
bakcyl bacilo \*balans balanco  
bakenbardv vangharoj balansjer ekvilibrilo  
(bokobrody) (przyrząd do balanso-  
bakfisz fraŭlineto, infani- wania), vekto (belka  
no, junulino, virguline- wagowa)  
to balany (zool.) balanidoj  
bakfong alpako (paki, żółędzie mor.)  
baki vangharoj (fawory- balas (arkit.) bariero, pa-  
ty), vizago (twarz), liseto  
vangoj (policzki) balasek bariero .  
\*na bakier fierporte (no- balaski barieroj, balu-  
szone dumnie), fiere, st-ado, kolonetaro  
fieresprime (wyrażając \*balast kromŝarĝo (obar-  
dumel, porfiere (aby czenie dodatkowe),  
się chełpić), oblikvpor- pli-tro-krompezafo  
te (noszone na ukos) (cipzar większy, zbyt  
bąknąć pod nosem ek- wielki, dodatkowy)  
murmuri (mruknać) b-lasy balustrado  
ekhalhuti (zamamro- \*baldaĉim (arab.) kur-  
taĉ), balhutparoli (mó- tenlito  
wić bełkocac), halbut- baldachogron (bot.) ko-  
respondi (odpowiedzieć rimbo  
bełkocac) haldaĉv (bot.) umbelo  
bakszyn (arkit.) briko (okółki, wiązki)  
bakszysz bakŝiŝo, dank- baldaszek (bot.) umbelo  
monn. logmono, kom- baldaszkowate (bot.  
nlezmono z baldaszkowców) um-  
bakulaĉia hastonado, vi- heliferoj  
pado (chłosta) baldaszkowce (bot.  
z wolnołatkowvch)  
bakulometria bakulome- umbelialoj, umbeliflo-  
trin (mezurado sen iloj) roi  
\*bal dancfesto ŝabawa balerina haletistino  
tan.) maŝkarado; tra- balikróvka (bot. obóvik)  
ho (graniasto ciosane cipripedio)

\*balon (aer.) balono, aerostato, (kem.) balono, retorto, (tekn.) balono, pilko

balota (bot.) marubio (murznica biała), baloteo (czarna)

\*balsam (przen.) konsolo (pociecha), felicigo (uszczęśliwienie), beno (błogostawieństwo), benstato (stan błogosławiony)

balsam polski (bot.) bazilio (bazylija), ocimo (fioletka)

balsamina (bot.) balzamenno. balzamino (niecierpek)

balsaminowate (bot. z dziobowców. niecierpkowate) balzamenacoj

balsamiec (bot.) balsamodrzew) mikroksilo

balsamka (bot.) ekbalio, momordiko (balsamowe jabłko, trucć)

balsamodrzew p. balsamiec

balsamowate (bot. z strączkowców) amirisacoj

balsamowe jabłko p. balsamka

balsamowiec (bot.) amiriso

\*balwierz frizisto, kombisto, razisto, tondisto

bałaban blufulo, fibravulo, fanfaronulo

bałakać (gadać, paplać) babili

\*bałamucić erarigi (wprawiać w błąd), babili (gadać), konfuzigi (wprawiać w zamieszanie), paroli senorde, sensence (mówić bez porządku, bez sensu), malklare, konfuze, tenti (kusić)

bałamucić się amindumi, erari, erarigi (mylic się), trompiĝi (oszukać się)

\*bałamutny babilema (gadaliwy), deloga (kuszacy), erariga (błędny), nekomprenebla, neklara

bałanda maldiligentulo, enuigulo, sentaŭgulo (niezdarny), fripono (nicpoń)

bałuch (oko błędne, zdziwione) okulaĉo, ĝapokulo

\*bałwan ĝrandaio (wielki kawał), ĝrandmaso (wielka masa), balondeo (silna fala), ŝprucendo (bitała fala morska), stultulo (głupiec), fetiĉo (fetysz). bałwan jako przezwisko: sentaŭgulo (nieodolega), fripono (łajdak)

\*bezpłciowy agama

\*bezpłodny agenezia, vana (próżny)

bezpodstawny senbaza, senkaŭza, vana, nepruvita, senfundamenta

\*bezzośredni rekta

bezpotność (anidroza) anidrozo, sensviteco

bezpownośnie senrevene, senreire, senapelacie,

senrevoke, nerevokeble, nerestitueble (nie

dając się odwołać, naprawić), por ĉiam, por eterne (na zawsze)

bez pretensji modesta (skromny), senpreten-

da, nepretendema, nepostulema, natura, naroganta

bez przyczyzny senkaŭza, senmotiva

bezpunktowość astigmatismo (astygmatyzm)

\*bezradny senhelpa

bez ratunku sensave

bezrodzajowy sengenera, senseksa

bezroga porko (wieprz), porkino

bezrogie (zool.) senkor-

bezrząd senleĝeco (stan bezprawia)

\*bezsenność maldorm-

(emo), dormomalpovo (niemożność spania)

\*bezseny maldorma

\*bezsens senraciaĵo

\*bezsilność adinamio, astenio, atonio

\*bezskuteczny vana (daremny)

bez śladu senpostsigne

\*bezsprzeczny senkontesta, senprotesta

bezskrzydłe (zool. z owadów) apteroj

bezsłowny neakurata, nefidinda (niegodzien zaufania)

bezsportny nenebla (niezaprzeczony), sendisputa, nedisputebla (niepodlegający dyskusji)

bezszypułkowy senpendunkla

beztaktowość malbon-

takteco, malbonkondu-

to

bez tchu senspira

beztęminowy sentermina

beztlenowce anaerobiulo, senaerovivulo

\*bezustanny daŭra (ciągły)

bezsusny senorela, senterila

bezwarnkowo nepre, senkondiĉe, peremptore

\*bezwarnkowy obligatora (obowiązkowy), senrespekta, nerespektanta (nieuznający wzglę-

dów)

\*bezwładny senpova, inerta

\*bezwłosy kalva (łysy)

- bez czucia anorgana,  
sensenta, anestezia
- \*bezczynność nenionfara-  
do, senfaro, inercio  
(bezwład)
- bezdźrzewny senligna, se-  
narba
- bezdźwięczność afonio  
(afonja)
- bezgłos afonio
- \*bezglowy acefala
- \*bezimienny sennomulo
- beźjadrek eūnuko, kastro-  
to, sentestikulo (bez-  
małek, eunuch, rzeza-  
niec)
- beźjęzykie (zool.) agłosoj
- bezkresny senfina, senli-  
ma
- \*bekształtny amorfa
- bezkwiatowe (bot.) arhe-  
ogoniatoj (rodnioyce)
- \*beźład anarhio, senleĝe-  
co, senreĝeco
- bezlist (bot.) ekviseto  
(chwozcz, skrzyp zi-  
mowy)
- beźłitosny senkompata
- beźłotek (zool.) apteno-  
dito
- beźmałek p. beźjadrek
- beźmeźna fraŭlino, sene-  
dza (beźżenny)
- \*beźmiar senmezura  
etendaĵo, senfinajo, ne-  
mezureblaĵo
- beź mocy wstecz działa-  
jącej senreefika
- beźmocz anurio
- beźmózgi anencefala,  
sencerba
- \*beźmyślny senpripensa
- beźnadziejność senesper-  
(ec)io, senespera stato
- \*beźnogi apoda
- bezoar bezoardo (bestin-  
testa kalkŝtono)
- tezocek (zool. z ryb.)  
mikseno
- bezognik (min.) pirokseno  
(augit, asbest amfibio-  
lowy, piroksen)
- bezogonowe (zool. z wą-  
skonosych) antropomor-  
foj
- bezogonowe płazy (zool.)  
anuroj, batrakoj
- beźparcjalność senpartie-  
co (beźstronność)
- beź pardonu senpardone,  
absolute, senindulge,  
senkondiće, senkonsi-  
dere
- beźpestkowy senkerna
- beźpędowe (bot.) ćeleca-  
joj, talofitoj (komór-  
kowce, plechowce)
- \*beźpieczeństwo certeco,  
sekureco
- \*beźpieczny ŝirmita (za-  
słonięty), certa (pew-  
ny), kaŝita (ukryty), se-  
kura (zabezpieczony)
- beźplamka amianto, as-  
besto (amjant, azbest)
- beźpłatkowe (bot.) sen-  
petaloj, apetaloj

- banagryk (bot.) adoniso
- (mitek)
- \*banalny ordinara, senen-  
hava (bez treści), tri-  
viala, vana (czyzy),  
vulgara (pospolity)
- \*banan (bot.) banano (ba-  
nan zwyczajny), pizan-  
go (pizang, diga rajaska)
- \*banda militistmuziko;  
kanajlaro (łotry), ara-  
ćo, fiaro
- \*bandura sakfajfalo
- banialuki babilajo, fipa-  
rolo, firakonto
- banian (bot.) banjano,  
hinda figujo (figa ben-  
galska)
- \*bańka bobelo (bańka  
piany), blazo (bąbel),  
veziketo (pęcherzyk),  
ujo, petrolujo (na nafi-  
te), oliwujo (na oliwę)  
i t. p.
- baptisterium baptakvujo,  
baptkapelo
- baptysta baptisto
- \*barak budo, tendo, hel-  
prifugejo, domansta-  
taŭejo
- \*baran (mek.) brećrompi-  
lo, enbatilo, murrOMPI-  
lo (taran), pistilego, pu-  
ŝegilo; brać na bara-  
na: sursultrigi
- \*baranki ŝafidpelto (ko-  
zuch), delikata cirusa,  
nubetaro (chmurki)
- barabie jądro alimelo
- baraniucha (bot.) arbuto  
(macznica, niedźwiedzie  
grono)
- barasz (zool.) cerasto  
(rogata źmija)
- barasnik parigisto (stre-  
czyciel, rajfur)
- barbakan barbikano (mur  
obronny, wieźa strzel-  
nicza)
- barbara barbara (imię,  
obca), ligustro (bot.)  
(ligustr, cicholas)
- barbaryzm (gram.) (nie-  
właściwe uźycie wyra-  
zu obcego: makaro-  
nizm) barbarismo
- \*barbarzyński necivilizi-  
ta, kruda (nieokrzes-  
ny), kruela (okrutny),  
tirana, sovaĝa (dziki)
- barczatka (zool.) lasio-  
kampe
- \*barczysty largęsultra.  
largęsultra
- \*bardzo ege
- baret (biret) bireto
- barez (materja przeźro-  
czysta) bareĝo
- \*barka boato, ŝipeto,  
gondolo
- barkan (bot.) hedisaro  
(siekiernica), lotuso (lo-  
tus), meliloto (nostrzyk)
- barok (ark.) baroko
- barówka kontantaĵo, tuj-  
pago (zapłata natych-  
miastowa)
- \*barszcz (bot.) herakleo  
(babimur, widłaczek)

- baruch** (bibl.) **baruko**  
 (prorok „błogosławiony”)  
**barw** (bot.) **stipo** (krę-  
 czynka, narduszek)  
**barwena** (zool.) **barbio**,  
**barbišo** (brzana, ma-  
 rena)  
**barweny** (zool.) (z cier-  
 niopłytwych) **muloidoj**  
**barwica** (bot.) **asperula**  
 (marzanka), **asperolo**  
**barwić się kolorigi**  
**barwnik pigmento**, **ko-**  
**lorigilo**  
**barwošlepota** (med.)  
 akromatopsio, daltonis-  
 mo  
**baryla ventregulo** (brzu-  
 chacz)  
**baryt** (kem., min.) **barito**  
**bas basvočo**  
**basen ujo**, **akvujo**  
**basinur** (čas.), **lup(ać)o**,  
 (wilk) **lupego**  
**basowy klucz bassłosilo**,  
**fokleo** (muz.)  
**bastal nenion plu!** **fino!**  
**bastard hibrido**, **mestizo**  
**bastonada baston(bat)-**  
**ado** (chłosta kijami)  
**bastówka striko** (bezro-  
 bociej)  
**basza bašao**, **pašaho**  
**batalja batalo**, **militiro**  
**baterja (elek.) pilaro**,  
**elementaro**  
**batuta taktilo**, **taktba-**  
**stoneo**

- bawelna** (bot.) **gosipio**  
 (el kiu oni produktas la  
 kotonon), **strzelnicza**  
**piroksilino**, **pulvokoto-**  
**no** (piroksylina)  
**bawić plezurigi** (n. p.  
 oczy)  
**bawół bufalo**  
**baza fundamento**  
**bazanowiec** (bot.) **lizima-**  
**hio** (pieniężnik, tojeść)  
**bazar vendejo**  
**bazgrała skribačulo**, **fuš-**  
**skribulo**  
**bazia** (bot.) **amento** (kot-  
 ki)  
**bazylejka** (bot.) **kalamini-**  
**to** (czyszcica)  
**bazylika** (bot.) **bazilio**,  
**ocimo** (fioletka)  
**bazyliżek** (człowiek o  
 złym wzroku) **maliculo**,  
**baziliskulo**  
**bażyna** (bot.) **empetro**  
 (żurawina)  
**bażynowate** (bot. z za-  
 pianowców) **empetracoj**  
**bdelium bdelio**, **bedelio**  
 (gat. pachnącej żywicy)  
**bdły** (bot.) **protofitoj**  
 (pierworosłe)  
**beatyfikacja beatigo**  
**beczec płorači**  
**beczka nağobarelo**, **buo**  
 (baka) (mar.)  
**bedel** (pedel) **pedelo**, **ler-**  
**neja suboficisto**  
**bedłkowane** (bot. z hime-  
 nomicetów) **agarikacoj**

- bednarek czteroplam**  
 (zool.) **histero** (glinik)  
**begonia** (bot.) **begonio**  
**bej** (tur. „pan”) **bejo**  
**bejcować korodi**  
**bekas bekaso**  
**bekas kszyk bekaseno**,  
**galinağo**, **galeskolopo**,  
**marčobekaso**  
**bekas słonka rustikolo**,  
**arbarbekaso**  
**beknąć enfali**, **malğajni**,  
**perdegi** (ponieść stratę)  
**beksa** (zool.) **cebuso**  
**beladona** (bot.) **beladono**  
 (szalej, wilcza jagoda)  
**belfer hederinstruisto**  
**belt jetilo**, **arkjetilo**  
 (strzała z łuku)  
**beltać kirli**  
**bembeks** (zool.) **bembeko**  
 (grzebacz, sflaks)  
**bemol** (muz.) **bemolo**  
**ben filo** (arab. syn)  
**benedykcja beno**  
**benwolencja bonvoleco**  
**ber** (bot.) **fleo**, **fleumo**  
 (brzana, tymotka)  
**ber myszy** (bot.) **falaro**  
 (ostrzyca, moźga, tra-  
 wa kanarkowa)  
**berek** (bot.) **azerolo** (głóg  
 biały, azerola)  
**bereka** (bot.) **sorbo**, **sor-**  
**po** (breknica, brzęk)  
**beret bireto**  
**berkut** (zool) **oraglo**  
 (orzeł zwyczaj., birkut)

- berlo** (bot.) **astodelo** (le-  
 liwa, złotogłowiec)  
**bernard pustelnik** (zool.)  
**paguro** (z dziesięcio-  
 nog.)  
**bernardyn** (ekl.) **bernar-**  
**deno**  
**bernardynek** (bot.) **ako-**  
**nito** (czarnobyl, lisia  
 róża, mordownik, to-  
 jad, tojeść)  
**bernikła** (zool. z gęsi)  
**bernaklo**  
**beryl** (kem.) **berilio**  
 (min.) **berilo**, **akvama-**  
**rino**  
**bez** (bot.) **lilako** (bez  
 włoski), **ebolo** (bez  
 polny, hebd.)  
**bezbarwny akromata**  
**bezbolesnie sendolore**  
**bezbożnik sendiulo**, **mal-**  
**kredulo** (niewierzący),  
**senkonfesulo** (bezwy-  
 znaniowy)  
**bezbożny ateista**  
**bezbrzeżny senmezura**,  
**nekvietigebła** (żal)  
**bezelowy sencela**, **vaga**  
 (błąkający się), **vana**  
 (daremny)  
**za bezcen malkarege**,  
**malkostege**  
**bezczenny karega**, **ko-**  
**stęga**  
**bezczaszkowe** (zool.)  
**akranioj**  
**bezczelny aroganta**  
**bezcześcić profani**

Granda estas kaj la merito de la Firmo Hirth & Sohn kaj de la Estro de la Esperanto-Fako s-ro B. Kötz.

La libro estas trege interesa, sed ne tuj tralegebla, ĉar enhavas multajn detalojn, pri kiuj oni vole-nevole devas ofte enprofundiĝi en la penson kaj senton de la aŭtoro.

Jam la Antaŭparoloj de Zamenhof estas gravaj, ĉar montras la ĝeneralajn ideojn de la Esperanto. Ĉio ĉerpita ne el la gazetoj, sed el broŝuroj kaj libroj. Ili informas la leganton pri la ĉefaj celoj de Esperanto.

En la Antaŭparolo al la Unua Libro, aperinta en la lingvoj: rusa, pola, franca, germana en 1887 j. Zamenhof antaŭvidis baldaŭan, morton Volapük, ĉar la lingvo ne respondis al la starigitaj de li kondiĉoj por la Mondlingvo.

En la dua libro aperinta post unu jaro, li konstatas, jam grandan aplaudon por siaj ideoj. La bona genio de l' homaro vekigis! ĉiuj rapidas porti sian ŝtonon por la granda, grava kaj utilega konstruo. Vivu la homaro, vivu la frateco de popoloj, ekkrias entuziasmigita Zamenhof. Sed alvenas diversaj klarigoj al komprenuloj kaj malkomprenuloj. Komenciĝas la komplimentoj unuflanke, instruado eĉ moralizado el la alia flanko. „Anstataŭ provi per ilia propra orelo, ĉu mia lingvo estas bonsona aŭ ne, ili teorie parolas pri leĝoj de bonsoneco! Kelkajn fojojn mi eĉ legis longajn artikolojn pri mia afero, kie estis videble, ke la aŭtoroj eĉ ne vidis mian verkon“.

La verko de Zamenhof estis tiel genie eltrovita, ke nur kelkaj malgrandaj ŝanĝoj aperis post longa diskutado.

Priparolante la gazetartikolojn estas necese ne forgesi, ke la unua Gazeto „La Esperantisto“ 1889 estis eldonata de Chr. Schmidt sub la kunlaborado de d-ro Esperanto. El la I. n-ro de 1892 ni ekscias, ke la gazeto estos eldonata de d-ro Zamenhof kaj W. H. Trompeter, kaj ke ĝi nomiĝos Esperantisto. Kompletaj jarkolektoj de Esperantisto ekzistas hodiaŭ nur ĉe tri personoj. La 15 n-ro enhavas la regularon de la Ligo Internacia de Esperantistoj. La provizora komitato konsistas el S-roj: Hugo Barbeck, Chr. Schmidt kaj Joseph Gagel, ĉiuj en Nürnberg. Sekvas la projekto de Akcia societo. En la artikolo 55, Ĉirkaŭrigardo, Z. konstatas, ke la afero kreskas kaj la nombro de ellernintoj post kelkaj jaroj kreskis ĝis 15—20.000 precipe en Rusujo (kun Polujo), Germanujo kaj Svedujo, ke jam ekzistas kelkaj Esperanto-klubo kaj ke estas tradukitaj kelkaj gravaj verkoj esperanten el angla, franca, germana, pola, rusa kaj aliaj lingvoj.

Memkompreneble Z. devas konstante bataladi kun multegaj reformuloj. Ĉiu opinias, ke tiu aŭ alia reformo estos nepre necesa. Z. kontraŭbatalas ĉion dirante, ke antaŭ ĉio oni devas elprovi la reformojn praktike, tamen ne per skribado de verkoj aŭ leteroj en nova dialekto, sed nur oferante unu apartan rubrikon por elprovo en nia gazeto. Estas necesa kondiĉo por ke ni evitu Babilonan miksaĵon. Jam en la jaro 1905 Z. konstatas, ke ĝisnunaj amikoj de Volapük preskaŭ ĉiuj iĝis esperantistoj.

N-ro 114 enhavas projektatan tekston de la Deklaracio dum Boulonja Kongreso. En N-ro 123 nia Majstro estas frapita de sciigo ke unu el plej valoraj helpantoj, D-ro Emilo Javal, kiu estis la ĉefa monhelpanto de la Cetra Oficejo en Geneve — mortis. Kvankam

blinda kaj maljuna li ellernis Esperanton perfekte kaj fordonis sin per tuta sia koro.

Komence de la 1911 Z. konstatas kun sia granda bedaŭro ke la nombro de malamikoj kaj reformemuloj kreskas paralele kun plia disvastiĝado kaj disvolviĝo de la Esperanto. La lingvo estas ofte atakata. Oni komencas suspektadi Majstron, ke li havas grandan profiton el sia eltrovo. Li ja ricevis de la firmo Hachette grandan monsumon!

En la jaro 1917 li serĉas eldoniston por la tradukoj de la plej gravaj literaturaj verkoj el la mondliteraturo. Tiu ĉi artikolo estis la lasta. Post nelonga tempo li ne plu estis inter ni.

El la Traktaĵoj ni citos kelkajn liniojn: Fund. Krestomatia kvina eldono p. 268.

„Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinda obstina malkonfido, sed eĉ kun ia malklarigebla malamikeco. La pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi: oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn. Dum la homoj, kiuj okupas sin je ĉia plej sencela kaj plej senutila sensencaĵo, se ĝi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ la honoran nomon de instruituloj aŭ utilaj publikaj agantoj. La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom moko kaj atakoj... la unua renkontita gazeta felietonisto skribas pri ili spritajn artikolojn... kaj la publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj, ridegas kaj ne faras al si eĉ por unu minuton la demandon, ĉu ekzistas eĉ guto da senco kaj logiko en tiuj spritaj artikoloj“.

Ĉu tiuj doloremaj vortoj ne estas la samaj de ĉiuj grandaj eltrovintoj?

Ĉiuj traktaĵoj estis vere indaj de enprofundiĝo kaj tralegado kun atentego de tempo al tempo kun premita koro, kiel premegita ofte estis la koro de genia eltrovinto, la koro kiu fine rompiĝis ne povinte toleri barbarajn kruelaĵojn de la milito.

Ni ripetas ke la libro estas unu el plej rimarkindaj Esperanto verkoj. El la Leteroj vi povas studi tutan vivon de nia kara Majstro, kaj admiri lian amon por la tuta homaro kaj por la grandioza ideo.

O. Bujwid.

## EL LA NE-ESPERANTA GAZETARO.

**E**speranto kiel internacia lingvo sendube faras progresojn. Malgrandajn, sed konstantajn. Oni povas tion rimarki el la literaturo speciala, ĝenerala kaj speciale lingvista, kiu lastatempe multobliĝas. Eldono de Zamenhova verkaro estas ja certa fundamento-bazo por venontaj generacioj kiel antaŭ kelkaj jaroj eldonita de Privat — Vivo de Zamenhof. Ne malpli valora estas ankaŭ Bibliografio de Internacia lingvo de Stojan. Pri tiu libro ni parolos detale.

Hodiaŭ ni volas rimarkigi alian gravan subtenon, kiun al Esperanto movado komencas havigi neesperanta gazetaro, subtenon

por nia movado multe pli gravan ol niaj pure esperantaj gazetoj. Mi parolos speciale pri la franca gazeto: *Eclaireur du Soir* eldonata en Nice. Sinjoro Verdastelo estas por la Esperanto-propagando vere nekalkulebla forto, ĝis nun por liaj samlandanoj, sed, mi opinias, devas estiĝi por ĉiuj Samideanoj. En tiu-ci gazeto vi trovas ĉiusemajne bonege skribitan poresperantan artikolon, kie vi trovos tutan esperantan movadon ne nur en Francujo, sed en la tuta mondo. Kaj kiel sprite estas skribitaj tiuj artikoloj!

En unu el la lastaj numeroj vi trovos ekzemple bonegan karakterizon de tri francaj personoj, gravaj politikemuloj, el kiuj du, tute neatendite, devis ŝanĝi ilian opinion pri Esperanto, la tria restis mokema espereble por ne longa tempo.

Ni ekscias, ke aperas *La tribune esperantiste*, kiu en Francujo popularigos inter la komercistoj interesigon por Esperanto kiel komuna internacia lingvo. Nia altestimata samideano inĝ. Gueritte estas unu el pioniroj de tiu trimestra Revuo.

Ni, trovas tie kelkajn tre valorajn opiniojn pri Esperanto de S-ro Prezidanto Miklas (Austrujo), de fama franca scienculo, Direktoro de la Instituto Pasteur en Parizo Dro E. Roux, kaj de aliaj. Ni ekscias pri la Lyona Universitata Kongreso, sub la prezidanteco de Rektoro Gheusi. Ni ekscias ankaŭ pri la Kongreso de Inĝenieroj en Tokio (kongreso Internacia), kie oni alprenis la rezolucion pri la uzado de Esperanto. En Grekujo la Ministro de popola Instruado rekomendas Esperanton por la Instruistaj kaj popolaj lernejoj.

Oni konstatas, ke en Francujo troviĝis personoj oferemaj pri monrimedoj por la propagando: 50.000 fr. donacis Samideano E. Archdeacon. S-ro Farman 10.000 fr. Nekonata persono por la *Maison de Esperanto* 50.000 fr. Ankaŭ en Nova Zelando S-ino Ensom antaŭ nelonge mortinta oferis 62.500 fr. por la disvastigo de Esperanto per *Workers Educational Association*.

Ni ne citos pluajn argumentojn kaj valorajn sciigojn el tiu simpatia *Jurnalo*. Ni deziras nur ke aliaj neesperantaj gazetoj prenu bonan ekzemplon kaj sekvu ĝin. Ne nur Esperanto movado sed ĉiuj homoj de bona volo estos tre dankemaj.

Ni ne devas forgesi ke aliaj francaj *jurnaloj*, inter ili unuavice *Pariza potaga Gazeto Pax* de tempo al tempo publikigas poresperantajn artikolojn. Ankaŭ grava *jurnalo*, kiu disvastigas favorajn opiniojn pri lingvo internacia.

Tio pruvas, ke alvenis pli favoraj tempoj por nia movado en Francujo, kiu post la milito iĝis iomete ne favora, almenaŭ ne tiel favora, kiel dum la *Boulonja Kongreso*.

O. B.

## TRADUKA KONKURSO.

La plej bona tradukinto de ĉi subaj frazoj, kiu sendos sian ellaboraĵon antaŭ la 15 de marto k. j. ricevos premie libro(j)n en valoro de 4 zł. La solvo aperos en aprila numero de P. E.

Zbyt cienki papier przebija pismo na drugą stronę. Zupełnie nie zależy mi na tem, co ludzie tego pokroju będą o mnie mówili. Pokrój lipy jest zupełnie inny od pokroju topoli. Jestem ciekaw, czy naprawdę owa książka jest tak bardzo ciekawa. Zdębiałem, usłyszawszy tę wiadomość; włosy mi jeżem stanęły i nie mogłem słowa ze siebie wydusić. Droga była ciężka, narowiste konie co chwila stawały dęba, strzygąc ciągle uszyma. A mój kary położył po sobie uszy i rwał

przed siebie, jak wichur. Ruszyliśmy z kopyta. Och, a to będzie ślizgawica, gdy przymarznie! Interesuję się wynikami rozgrywek w piłkę nożną. By zainteresować publiczność, stosowano coraz nowe pomysły. Ho, to szczywana sztuka! Wygłodzeni, zmłóciiliśmy z apetytem obfitą wieczerzę. Wziął na kiel i nie dał się wyprzedzić. Na co ci się zda wierzganie przeciw przeznaczeniu. Znany z tego, bardzo często strzela baki. Znalazł się w opałach. Nawet przebiegłością swoją tam nic nie wskóra. Praca dla zabicia czasu nie daje dobrych wyników.

Tradukon bonvolu sendi laŭ adreso: Dr. L. Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

## POLLANDA KRONIKO.

**BĘDZIN.** La 17-an de jan. okazis jara ĝenerala kunveno, kiun ĉeestis 40 membroj. Estas elektita nova estraro, kaj jen I. Sercarz — Honor prez., I. Kozłowski — prez., M. Ferens — vicprez., J. Zauberman — sekret., H. Openhajn — kasist., H. Szpigler, J. Cwajgenbaum kaj S. Landkart estraranoj.

**LWÓW.** La 19 de dec. okazis en ĉi loka Esp.-Societo solena Zamenhofa festvespero, kiu tre bone prosperis. Ĉeestis multaj gastoj. Nuntempe gvidas f-ino Nadel kurson, kiun partoprenas 30 gelernantoj.

**NIEŚWIEŻ.** Jam de post 1928 j. ekzistas ĉi tie gimnazio esp. rondo, kiu ĝuas bonvolan subtenon flanke de s-ino prof. Serwacka. Dum ĉiusemajnaj kunvenoj estas legata Pola Esperantisto kaj Heroldo de Esperanto, krom tio oni priparolas diversajn esp. problemojn. S-o Wsiewołod Kuczarow, prezid. de la rondo prelegis antaŭ nelonge pri Esp. Nombro de l' adeptoj kreskas en la urbo dank' al senlaca propagando de l' membroj.

**NOWA WIEŚ** (Silezio). Kun helpo de s-o Pierhala el Knurów fondiĝis ĉi tie esperantista grupo „Konkordo“ kun 19 membroj. Prezidanto de la grupo estas s-o Halek Jozefo, Nowa Wieś, ul. Kochłowska 3.

**NOWY SĄCZ.** Estas gvidata Esp.-kurso en TUR (Societo de laborista universitato). Detaloj mankas.

**SOSNOWIEC.** Samideanaro en Sosnowiec kaj ĉirkaŭaĵo estas frapita tre forte, perdante maljunan (56 jaran) fidelan kaj de ĉiuj amatan, simpatian samideanon Evald Sauter. — La malĝojo estas tiom pli granda, ĉar la morto okazis neatendite. Esp. Delegitaro de Zagłębie sendis al vidvino kaj ĝefiloj sian bedaŭron kaj sur tombon metis florkronon kun verdaj rubandoj.

## 22-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

**Oxford 2-a 9-a Aŭgusto 1930.**

**Adreso por leteroj:** Sekretario, 22a Universala Kongreso de Esperanto, 142 High Holborn, London, W. C. 1., Anglujo.

**Kongresejo:** La Urbdomo de Oxford.

**Kotizo:** Por ĉiu kongresano senescepte: 20 ŝilingoj britaj (proksimume 5 usonaj dolaroj). Estas oportune sendi la kotizon per brita ŝtata monbileto por unu funto sterlinga, havebla ĉe bankoj kaj monŝanĝejoj en ĉiuj urboj. Oni sendu la kotizon (per registrita letero) antaŭ la 1-a de julio. **Post tiu dato la kotizo estos 30 ŝilingoj.** Aliĝu jam nun kaj helpu la laboron de la L. K. K.

**Kotizo por Infanoj:** Por infanoj, kiuj ne havas pli ol 15 jarojn, la kotizo estas 5 ŝilingoj britaj.

**Help-Kongresanoj:** Tiuj, kiuj ne povas ĉeesti la Kongreson, povas tamen aliĝi kiel help-kongresanoj po 10 ŝilingoj. Ili ricevos la kongres-insignon kaj dokumentojn post la Kongreso.

**Blinduloj:** Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongres-karton senpage, sed iliaj aliĝoj devas esti aprobitaj de s-ro W. P. Merrick (adreso: Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo).

**Aliĝoj:** Jam 170.

**Aliĝiloj:** Nun haveblaj ĉe la kongresa oficejo en Londono.

**Garantia Kapitalo:** La L. K. K. zorge penos eviti ian financan deficiton, sed por certigi kontentigan bilancon, ĉi tiu kapitalo estas fondita. Sumo jam garantiita: £ 81 : 10ŝ : Op.

**Donacoj:** La L. K. K. volonte ricevos donacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevita: £ 11 : 0ŝ : Op. F-ino „Sennomulino“ jam promesis donaci al la Komitato cent specimenojn de anglaj manfabrikaĵoj por vendo dum la Kongreso, por helpi al ĉi tiu kaso.



**Magistrata Akcepto:** La Urbestro de Oxford jam promesis gastigi la kongresanojn unu vesperon dum la semajno, kaj la Urbestro oficiale bonvenigos la Kongreson al Oxford dum unu el la oficialaj kunsidoj.

**Kongreslibro:** La L. K. K. esperas dissendi la kongreslibron al ĉiu kongresano je la fino de junio.

**Fervojrabato:** Ĉiu kongresano ricevos rajtigilon por revenbileto, de iu ajn brita fervoja stacio aŭ haveno al Oxford, po unudirekta prezo plus triono. Zorge notu, ke tiu privilegio validos nur de la 1-a ĝis la 11-a de aŭgusto, kaj nur por reveno al la deira urbo.

**Glumarkoj:** Belaj kongresaj glumarkoj estas nun haveblaj de la kongresoficejo. Prezo por cent, unu ŝilingo brita.

**Fakaj Kunvenoj:** Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

**Koncertoj:** La L. K. K. danke ricevos kaj zorge konsideros fruajn proponojn deklami, kanti, ludi, ktp., ĉe kongresaj koncertoj.

**Ekspoziciaj Kostumdancoj:** Anstataŭ prezenti ĉi tiujn dum la balo, oni aranĝos apartan vesperon, kiam oni prezentos ilin sur estrado, por ke ĉiu bone vidu. La sekretario plezure ricevos proponojn de kongresanoj, kiuj povos inde prezenti tiajn dancojn, precipe naciajn.

**Poŝtkartoj:** Poŝtkartoj de Oxford kun teksto en Esperanto nun estas pretaj. Prezo por paketo enhavanta 12 poŝtkartojn: 1ŝ. 2p. afrankite.

## PRINTEMPA FOIRO LEIPZIG 1930

2-an ĝis 8-a de Marto.

Ni atentigas ĉiujn vizitantojn de nia Foiro, ke en ĝi ili trovos specialan kaj oficialan Renkontejon por la esperantistaj foiruloj. Ĝi estas ĉiutage (ankaŭ dimanĉe) malfermata de la 8-a ĝis 18-a horo. Estas devo de ĉiu samideano, vizitanta la foiron, ke li vizitu la Renkontejon. Ĝi troviĝas en la centra urbo, en la ejo de la Germana Esperanto-Instituto, Johannisplatz 3. I. kaj en ĝi la samideanoj povas renkonti alilandajn samideanojn aŭ tien inviti konatulojn, trovi ĉiun helpon kaj ĉiujn informojn rilate la foiron, skribi tie leterojn kaj tien sendigi leterojn.

La Leipzig-a Foiro estas la plej granda specimenfoiro de l' mondo, regule vizitata de ĉirkaŭ 175.000 interesuloj, inter ili 29.000 vizitantoj eksterlandaj el preskaŭ ĉiuj landoj. Ĝi estas kaj internacia (jam pro la partopreno de 700—1000 eksterlandaj ekspozantoj el 24 landoj) kaj universala (ĉar ĉiuj industriaj branĉoj estas reprezentataj en ĝi). Cetere ĝi estas tre superrigardebla en 39 foirpalacoj por la specimenfoiro en la centra urbo kaj en speciala giganta tereno por la teknika foiro.

## ALVOKO AL LA ESPERANTISTA VIRINARO.

Sciigo pri la „Unuiĝo de esperantistaj virinoj“.

Laŭ teksto de nia raporto en la oktobra numero de „Esperanto“ la virina kunveno dum la XXI-a kongreso en Budapest decidis unuiĝi la virinfortojn esperantistajn por du celoj:

- 1) helpo por akiri rajtojn al la virinoj,
- 2) antaŭenigi la pacmovadon.

En tiu senco mi redaktis regularon kaj petas aprobon de la esperantista virinaro.

Ĉar la elspezoj en la komenco ne estos grandaj (nur poŝt- kaj eventualaj preskostoj), mi proponas, ke ĉiu aliĝontino almetu al sia aliĝa letero kvindekcentiman respondkuponon — aŭ egalvaloron de kvindek svisaj centimoj — kiel jar-kotizo por 1930. Tiu sumo estu deviga, sed pligrandajn oni povas sendi laŭvole. Nia prezidantino, s-ino Marcelle Tiard jam sendis 100 francajn frankojn (hung. Pengö 22.30) kaj mi almetis la saman sumon, por ke nia kaso — kiun mi prizorgas — enhavu almenaŭ la unuajn enspezojn.

Kiel la unua punkto de nia programo montras, nia „Unuiĝo de esperantistaj virinoj“ estas starigata en intereso de ĉiuj virinoj, t. e. ne nur por plenkreskulinoj, sed ankaŭ por la junularo, kiujn ni povos helpi en multaj rilatoj. Pro tio estas nepre dezirinde, ke aliĝu ankaŭ knabinoj kaj junulinoj.

La de mi preparita regularo estas jena:

- 1). Ĉiu anino de la „Udev.“ havas la devon morale helpi la unuiĝon en ĝia laboro.
- 2). La „Udev.“ havas la devon helpi, t. e. doni moralan apogon al siaj aninoj dum ilia lukto por virinrajtoj kaj dum ilia laboro en intereso de l' paco.

- 3). La aninoj de la „Udev.“ interrilatiĝu kun la feministaj societoj de la koncernaj landoj kaj helpu ilin dum lukto por virinrajtoj kaj paclaboro.
- 4). La aninoj de ĉiu lando elektu inter si korespondantinon, kiu havos la devon informi la sekretariinon de „Udev.“ pri nove akiritaj rajtoj de virinoj kaj pri paŝoj faritaj en intereso de l' paco en la koncernaj landoj.
- 5). La sekretariino havas la devon sciigi — pere de la gazetoj — al la „Udev.“ pri la novaj akiritaj rajtoj aŭ pri la paŝoj en intereso de l' paco en ĉiu lando.
- 6). La sekretariino havas la devon fari ĉiujare raporton pri la farita laboro kaj pri stato de l' kaso kaj laŭtlegi ĝin dum la virina fakkunveno de l' kongreso. (En kazo de neĉeesto, ŝi sendu la raporton al anstataŭantino).
- 7). La „Udev.“ kiel tuto kaj siaj aninoj unuope havas la devon antaŭenhelpi la pacmovadon t. e. influi siajn idojn aŭ lernantojn en tiu senco.
- 8). Dum laboro por virinrajtoj aŭ en intereso de l' paco la aninoj de la „Udev.“ havas la devon oficiale akcenti, ke ili agas en nomo de la „Udev.“.
- 9). Ĉiu anino havas la rajton peti moralan apogon kaj konsilon de la „Udev.“ por sia agado ĉu en paca kampo, ĉu dum lukto por virinrajtoj.
- 10). Ĉiu anino havas la devon pagi la modestegan jarkotizon.

Proponojn por plibonigo aŭ pligrandigo de tiu regularo oni bonvolu sendi al mia suba adreso.

La sekretariino.

S-ino Nora Kozma.

Budapest VI., Andrásy ut 5.

## ALSENDITAJ GAZETOJ.

Heroldo de Esperanto, Köln.

Esperanto, Ofic. Organo de UEA, Genève.

L' Eclairer du Soir, Nice.

Pax, Organe hebdomadaire de la solidarite mondiale, Paris.

La Movado, Org. de la Franca Societo, Paris.

Angla-Skota Esperantisto, London.

Interligilo de P. T. T., Paris.

Svenska Esperanto Tidningen, La Espero, Stockholm.

Sennaciulo, Ofic. Organo de Sen. As. Tutm.

Esperanto-Uutiset, Helsinki Finlando.

Bulteno de la Intern. Labor-Oficejo, Genève.

Espero Katolika, Ofic. Organo de I. K. U. E. Paris.

Irish Esperantist, Of. Organo de Irlanda Esp. Asocio, Dublin.

Bulgara Esperantisto, Ofic. Organo de Bulgara Esp. Asocio, Ruse Bulgarujo.

Kataluna Esperantisto, Barcelono.

Dordrechta Esperantisto, Dordrecht, Nederlando.

Oomoto, Organo de Oomoto movado, Kameoka, Japanujo.

ISK, Org. de Intern. de Socialista Kunbatalo.

Pedagogia Revuo, Of. Org. de Tutm. As. Geinstruista, Leitmeritz.

International Language, Brit. Esp. As., London.

Bulteno de Intern. Scienca Asocio Esper., Paris.

Internacia Medicina Revuo, Org. de TEKA, Bruxelles.

Hungara Heroldo, Budapest.

Revuo Orienta, Org. de Japana Esper.-Instituto, Tokio.

Hinda Esperantisto, Semarang, Java.

Belga Esperantisto, Belga Esper. Ligo, Antverpeno.

Poczta, Org. Zw. Pracown. Pocht., Telegr. i Telef., Warszawa.

Polska Pacyfistyczna, Org. Przyjaciół Paneuropy, Katowice.

Utrechta Esperantisto, Of. Org. de Rondo Utrechta.

Aŭstria Esperantisto, Org. de Aŭstria Esp. Asocio.

Picardie Esp., Org. de Picardia Klubo, Amiens.

**Harcerskie Koło Esperanckie**, urządzając wkrótce tydzień propagandy esperanta, prosi gorąco o nadesłanie odpowiednich listów, pochodzących z korespondencji z zagranicą, w których znajdowałyby się opinie cudzoziemców o Polsce, pochlebne czy niepochlebne, ich wrażenia z pobytu itp. Mogą być również tylko odpisy odnośnych ustępów. Listy oryginalne (ewent. i odpisy) zostaną zwrócone, po wykorzystaniu ich przez wyświetlenie odpowiednich ustępów na ekranie. Prosimy podać nazwisko autora listu, kraj i zawód. — Adres przewodniczącej: M. Kazanowiczówna, Kraków, Lubomirskiego 43.

Drukarnia L. Gronusia i S-ki w Krakowie, ul. Stolarska 6. Telefon 1018.

## KIU DEZIRAS LOGI EN PARIZO?

En Parizo, modeleganta kvartalo, altburĝa sinjorino deziras luigi al fremduloj aŭ — inoj ĉambrojn kun banejeto moderne elegantajn. Manĝoj ĉe la dommastrina tablo; prezoj kaj kondiĉoj favoraj. Por pli detalaj informoj skribu al s-ro J. Em. Sédillot, del., 5 Rue Manceau, Tours, I. et L., Francujo.

### POLSKIE AKADEMICKIE TOWARZYSTWO ESPERANTYSTÓW

**prowadzi kurs korespondencyjny języka międzynarodowego Esperanto.**

Kurs polega na tem, że uczestnik jego otrzymuje bezpłatnie podręcznik języka Esperanto, podzielony na 12 lekcji, przerabia co tydzień jedną lekcję, tłumaczy ćwiczenia z Esperanta na polski i odwrotnie oraz przesyła je do poprawy. Ćwiczenia po poprawieniu zostają odesłane na koszt Towarzystwa. Aby zostać uczestnikiem kursu należy wpłacić zł. 10.

Oplaty należy uskuteczniać pod adresem:

**Sekretariat Polskiego Akademickiego Towarzystwa Esperantystów, Warszawa,  
Leszno 99 m. 5, tel. 198-37.**

Ćwiczenia należy przysyłać w zeszycie.

## Libreja Fako de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

### REKOMENDAS:

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Balucki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio	1.30
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bcnnsels — Solandro	2.20
Bratescu-Voinesti — Niĉjo Mensogulo k. aliaj noveloj	0.65
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Butler — Himnaro Esperanta	3.00
— Kantaro Esperanta	3.00
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komedi. trad. Ant. Grabowski	1.60
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20
Glumarkoj „Babel“ 10 pecoj	0.10
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krijoj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hector Hodler — Lia vivo kaj lia verko	4.00

Hiller — rio, tiuj tremdujoj, opereto . . . . .	1.40
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków . . . . .	1.50
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30.	
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928 . . . . .	5.00
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929 . . . . .	6.00
Jung — La alta kanto de la amo . . . . .	1.80
Kant — Al eterna paco . . . . .	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj . . . . .	0.80
Karinthy — Morgaŭ matene . . . . .	2.60
— Norda vento; novelkolekto . . . . .	1.30
Konferolibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita . . . . .	1.00
Korolenko — La sonĝo de Makaro . . . . .	0.65
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912 . . . . .	0.80
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj . . . . .	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski . . . . .	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm . . . . .	4.30
Linnmann — Sprachliche Gutachten . . . . .	2.00
Malgranda terbiblo . . . . .	2.00
Márimbe — Maten Falcone k. aliaj rakontoj . . . . .	0.65
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski . . . . .	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java . . . . .	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof . . . . .	2.60
Pola Kristnaskaĵ Kantoj . . . . .	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof . . . . .	5.40
Ramo — En Svislando . . . . .	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe) . . . . .	1.20
Schmidt — La amkonkurantoj . . . . .	0.85
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Ariŝ. trad. Ant. Grabowski . . . . .	1.40
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano . . . . .	1.00
Stello esper. en pola lingvo . . . . .	0.60
Tatroj kaj Zakopane . . . . .	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp. . . . .	5.00
Trochimowski — Kwestia języka międzynarodowego 10 ekz. . . . .	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III. . . . .	1.25
— Wyższy kurs . . . . .	2.00
Viény — La intervidigo kaj nekonita dialogo . . . . .	0.90
Wells — La dormanto vekigas . . . . .	5.00
Wiesefeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj . . . . .	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj . . . . .	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro . . . . .	1.10
Zawada — Peŝny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.) . . . . .	4.00

#### La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio . . . . .	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva) . . . . .	2.30
Lingvaj Respondoj . . . . .	2.80
Proverbaro Esperanta . . . . .	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parte po . . . . .	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido . . . . .	3.30
Gogol — La Revizoro . . . . .	3.30
Heine — La Rabeno de Baharaĥ. La Gimnazio . . . . .	2.30
Molière — Georgo Daudin . . . . .	1.75
Orzeszko — Marta . . . . .	5.50
Schiller — La Rabistoj . . . . .	3.30
Shakespeare — Hamleto . . . . .	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.